

juna amiko

Septembro 2024 • n-ro 3/2024 (180)





PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

△ Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Serbio. *Konversaciaj temoj:* Kiu kiel vestas sin por geedza festo. *Kantu kun Juna Amiko:* Verda Cirko. *LUDE:* Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto. *Legu kaj ĝuu:* Malgraŭ la malfacilaĵoj, sukceso... *Interkultura Mondo:* Simple Brazilo. *Tra la mondo:* Esperanto en nia vivo. *Laste:* Kvino-Kvizo: Novulo kun brila ideo, ĉu?

Kolibrido

Aŭtorino: Ana María Martínez
Desegnisto: Joel Pernas
Tradukisto: José de Jesús Campos






Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) 4

Konversaciaj temoj: Kiu kiel vestas sin por geedza festo (Judit Felszeghy, HU) 5



Ideo: Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 9

Recenzo: Mezvoje inter utopio kaj realismo (Luiza Carol, IL) 10



Kantu kun Juna Amiko: Verda Cirko (Małgosia Komarnicka, PL, José de J. Campos Pacheco, CU kaj Luiza Carol, IL) 12

Legu: Legu kaj ordigu! (Mireille Grosjean, CH) ... 14



LUME: El mia kolo-
ra vivo (Pavel Rak,
CZ) 16

LUDE: Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto (Mónika Molnár, CH) 17



Teatraĵeto: Verda Cirko 4 (José de J. Campos Pacheco, CU, Luiza Carol, IL kaj Odelvis del Sol, CU) 19

109-a Universala Kongreso de Esperanto, rezolucio 21

109-a Universala Kongreso de Esperanto, rezolucio 21



Legu librojn – premioj – konkursoj: Malgraŭ la malfacilaĵoj, sukcesoj... Klubo de bona libro. Rekomendo. Tanzanio, ĝiaj flago kaj blazono. Legendo.

Malkovrante gustojn de Toskanio (Dana Durman-Ulatowska kaj Małgosia Komarnicka, PL) 22



Tra la mondo: Esperanto en nia vivo (Rita Mkrtychyan, AM) 30



Interkultura Mondo: Simple Brazilo.... (Elena Nadikova, RU kaj Interreto) 31

Interkulture kaj inkluzive: (Aranka Laslo, RS; Jade Hugot, FR, Stefan-Octavian Filip, RO, Vuk Mladenović, RS, Blanka Laslo, RS) 35



Mia Sarajevo (Tarik Haĝirović, BA kaj Nedeljka Ložajić, RS) 36

LASTE: Kvino-
Kvizo: Novulo kun brila ideo, ĉu? (Stefan MacGill, NZ /HU) 38



Kie aboneblas Juna Amiko? Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko* ... 39

Kolibrido, bildstrio de José de J. Campos Pacheco, desegnis David Yabor, CU 40

Eldonanto de *Juna Amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo:** Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj:** Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>.

Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 173 (1972 ĝis 2022) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net.

Redaktoro: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Rob Moerbeek (Nederlando) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (Finnlando). Presita en Slovakio. **Administranto:** Hamzeh Shafiee, ilei.oficejo@gmail.com. La sekva numero aperos en Novembro 2024. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, Aprilo, Aŭgusto kaj Oktobro. **Jarabono** € 18 en t. n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

En granda parto de la mondo finiĝis la ferioj kaj komenciĝis la nova lernoĵaro. En la rubriko *Konversaciaj temoj* ni lernos kiel bone, bele kaj taŭge vestiĝi. En *“Stultaj ideoj”* de nia Mirejo ni denove lernos esti pli saĝaj. En la recenzo de Luiza ni konatiĝos kun humura libro inter utopio kaj realismo. Denove ni povos kune kanti, nun en Verda Cirko en Kubo, lerni uzi pluvombreton kaj taŭge vesti sin sub ĝi en *Legu kaj ordigu*, legi pri katoj en la rubriko *LUDE*, ankaŭ kolorigi bildojn kaj trovi diferencojn en la rubriko *LUME*. Eblos kudri vestaĵojn por pupetoj de gantopupistoj en la teatraĵeto *Verda Cirko 4* kaj ĉeesti la 109-an Universalan Kongreson de Esperanto en Afriko. En la rubriko *Legu kaj ĝuu* ni vizitos Urban Bibliotekon kaj

Universitaton de la Tria Aĝo en la itala urbo Montevarchi. En “Klubo de bona libro” ni konatiĝos kun la bela bildlibro por infanoj “Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero” de Mara Rockliff. Ni ekkonos Tanzanion, la urbon Aruŝa, kie ĵus okazis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, ankaŭ ĝiajn flagojn, blazonon, parkojn, oceanajn marbordojn, loĝantojn, tradiciojn, montegojn, legendon... Denove ni povos malkovri gustojn de Toskanio, en la Kulinaraj Laborsesioj de la monumenta Villa Costa kaj prepari kaj gustumi tieajn bongustaĵojn. Ni konatiĝos kun la Esperanta interreta grupo “Esperanto en nia vivo” – konversacia “tablo” por ĉiuj esperantistoj, ankaŭ kun Brazilo, kie okazis la ĉi-jara Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – kaj kun “Kvino-Kvizo” en la rubriko *LASTE*.

Agrablan legadon de *Juna Amiko* deziras al vi via redaktoro! **Stano Marček**

Karaj legantoj,

Finiĝis la somera sezono de Esperanto-kongresoj. Inter ili, la 57-a ILEI-kongreso okazis ĉeeste en Brazilo, kaj virtuale tra la tuta mondo, ekde la 20-a ĝis la 27-a de Julio 2024. Sur la paĝoj 31-34 de tiu ĉi numero Elena Nadikova, en sia ĉiam alloga rubriko, bone konigas la kongreslandon al ni.


La nombro de la virtualaj partoprenantoj estis pli ol la ĉeestaj kongresanoj – bonega novaĵo por nia Tero! Danke al la zorgema preparado de ekipaĵoj fare de la LKK, kiun estris Aristóphio Andrade Alves Filho, ankaŭ deforaj kongresanoj povis facile prelegi kaj starigi siajn komentojn kaj demandojn fine de ĉiu prelego. La ĉefa temo de la kongreso estis “Esperanto por justa edukado”. Mi havis la bonŝancon prelegi pri tio komence de la kongreso. Tie mi diris, ke en la moderna tempo justan edukadon garantias eduksistemo, kiu:

1. Estas alirebla por ĉiuj, sendepende de soci-ekonomia statuso, raso, genro, ktp.
2. Respektas kaj valorigas la kulturajn kaj lingvajjn diversecojn de ĉiuj lernantoj.
3. Provizas egalajn ŝancojn por sukceso de ĉiuj.
4. Kultivas kritikan pensadon kaj civitanan engaĝiĝon.
5. Estas inkluziva kaj adaptiĝema al diversaj lernbezoj.

Dum aŭskultado de aliaj prelegoj, mian atenton forte kaptis tio, ke nun pli ol 350 ludoj en Esperanto troviĝas en retpaĝo, kiu helpas ankaŭ al lernado de Esperanto. Tiuj ludoj estas alireblaj en: <https://learningapps.org/user/ladislau>. Mi petis la preleganton, Ladislau Afonso (Brazilo), verki artikolon pri tio. Feliĉe li faris tion kaj ĝi aperis en IPR 2024/3 sur la paĝoj 23-28. Tie vi konatiĝas ankaŭ kun apo por mem fari novajn ludojn!

Bonan lud(far)adon!

Ahmad Reza Mamduhi
Prezidanto de ILEI



Kiu kiel vestas sin por geedza festo

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. Grava demando: Kion survesti?

Dora (D) kaj Elza (E), du junaj amikinoj, babilas en la loĝejo de Dora.

- D – Bonege, ke vi alvenis, Elza! Vi povos helpi min, ĉu?
- E – Jes, certe! Pri kio temas?
- D – Vi scias, ĉu ne, ke nia amikino, Paŭla, edziniĝos la 26-an.
- E – Jes, ŝi invitis ankaŭ min.
- D – Bone! Kion vi surmetos? Ĉu vi jam scias?
- E – Jes! Mi havas tiun flamruĝan mezlongan robon. Ĉu vi memoras pri ĝi? Ĝuste tiun.
- D – Ho, vi bonŝanculino! Sed en kiu mi min vestu? Venu, rigardu mian ŝrankon!
- E – Tiu ĉi marblua kostumo estus tute taŭga, kun ĵaketo kaj jupo...
- D – Vi ne ridigu min, Elza! Tiun ĉi mi portis dum mia abiturienta ekzameno. Mi mem miras, kial mi ankoraŭ ne forigis ĝin el la ŝranko. Rigardu tamen tiun ĉi kremkoloran longan robon. Al ĝi apartenas du subjupoj, kaj la tria, la supra, estas el punto*. Ĝi estas rimarkinda, ĉu?
- E – Jes, por vespera festo. Vi ne klopodu aspekti kiel la fianĉino! Sed pendas apude bunta senmanika robo, kun ruĝaj floroj. Ĝi estas ĉarma, romantika, ĉu ne?
- D – Ho jes, ĉar ĝi estas almenaŭ centjara! Tiu robo jam elmodiĝas, sed mi bedaŭras forĵeti ĝin, ĉar mi ege ŝatis ĝin. Eble mi survestu nigran pantalonon, sed kiun ĉemizon?

- E – Ĉu blankan? Vi certe havas blankan, ĉu?
- D – Kion vi imagas, Elza? Ĉu mi aspektu kiel freŝbakita bankisto? Eble tiun ĉi nigran?
- E – Tro funebreca apero. Prefere la verdan.
- D – Ho, ne! Mi iros al geedza festo, ne al esperantista renkontiĝo! Krome, ĝi estas iom malvasta kaj malkomforta. Do, mi ne havas taŭgan vestaĵon. Mi pensas, ĉu mi aĉetu iun robon. Ĉu vi emas helpi al mi?
- E – Kiam?
- D – Nun, tuj.
- E – Nun? Sed mi...
- D – Ni iros nenien, ne timu! Ni butikumu en reta vendejo!



*) Punto: maldensa plektaĵo, trikaĵo.





II. Interreta aĉetado


Samtage, post kelkaj minutoj, Dora (D) kaj Elza (E), du junaj amikinoj, babilas en la loĝejo de Dora, ĉe la komputilo.

- D – Ĉu vi vidas tiun ĉi dekoltitan robon? Ĝi estas eleganta kaj alloga! La turkisa* koloro bone irus al mi.
- E – Jes... Mirinde! Pli sube trovu ties prezon. Ho! Kontraŭ tiu sumo mi aĉetos eĉ kvin similajn vestaĵojn.
- D – Vi pravas. Sed rigardu ties markon! Ĉe tiu ĉi marko paro da ganto kostas pli ol mia vintra mantelo. Do, ni forgesu ĝin. Mi iros plu.
- E – Tiuj estas jam vintraj vestaĵoj... Manteloj, sportaj jakoj, peltaj manteloj... – kaj kiaj prezoj, terure! Mi pensis ekhavi por mi novan vintran pantalonon, sed vidante tiajn prezojn, mi dubas, ĉu mi povos...
- D (*Daŭre ŝanĝante la paĝarojn*) – Kelkaj someraj restaĵoj, ofertoj... – nenio interesa...
- E – Haltu, Dora, ankaŭ ĉi tie troviĝas interesaj specoj.
- D – Ha, por mi tute ne. Ili ĉiuj estas preskaŭ la samaj. Mi deziras iun rimarkindan, unuecan, konforman al mia personeco!
- E – Ha, ha! Vi parolas kiel en mod-prezentado aŭ en reklamo. Mi tamen komprenas vin.
- D – Min ne amuzas la butikumado kaj rigardado de vestaĵoj. Sed se mi devas elspezi monon por io, mi volas, ke tio plaĉu al mi.
- E – Foje mi ŝatas rigardadi montrofenestrojn, dum mi promenas, aŭ hejmeniras el la laborejo. Ofte mi trovas ion plaĉan, aŭ ofertaĵon kun konvena prezo.
- D – Jen ĝi! Ĉu ne? Tiu ĉi estas ja via flamruĝa robo! Ĝi estas el silko!

Belega peco, kun la boatforma dekoltaĵo!

- E – Ho, vere! Eĉ ĝi kostas malpli ol la mia!
- D – Vidu, estas rabato! Ĉu vi scias, pri kio mi pensas nun?
- E – Ke ankaŭ vi aĉetos ĝin.
- D – Ĝuste! Do, ni vidu... Mezuro – 40.
- E – Atentu, Dora, ĉar ĝi estas eksterlanda robo, eble la numeroj malsimilas rilate la nian. Ni kontrolu la tabulon pri la mezuroj. Brusto... – Kiom vasta vi estas ĉe la brusto?
- D – 97.
- E – Kaj mezuru ankaŭ vian talion, kaj ni rigardu ankaŭ la longecon de la robo... Mi opinias, ke la grandeco 38 por vi sufiĉos. Ankaŭ mi aĉetis tiun grandecon.





- D – Bone, dankon! Estus malagrable tuj resendi ĝin, kaj mendi novan! Do, en la “korbon”. Mi petas ankaŭ liveradon... Eĉ tiel ĝi ne kostas tro multe. Sed, se ni portos la saman vestaĵon... ĉu tio ne estos malagrabla?
- E – Por kiu? Por mi, tute ne. Mi jam vidis, ke paroj vestas sin simile, kial ne amikinoj faru la samon?
- D – Fakte, jes. Mi pagos nun per karto... Numero, nomo, valideco, sekreta kodo. Bone.
- E – Via telefono, Dora!
- D – Jes, oni sendas al mi iun plian kodon pro sekureco, ankaŭ tiun mi kopias... Pagite. Ĉio pretas! Liverado ene de 3 labortagoj! Ho, mi ĝojas pri tiu nova belega robo, kaj dankon por via helpo!



III. Dum la ceremonio

Dora (D) kaj Elza (E), kaj ankaŭ iu viro kun barbo (VB) babilas, dum la geedza ceremonio.

- D – Paŭla aspektas belege! La frizaĵo, la ŝminko, kaj tiu robo!
- E – Ŝi ja ne estas tre svelta, kaj laŭ mi la supra parto estas iom tro dekolita. Sed la jupo el brokaĵo vere plaĉas al mi. Ankaŭ la vualo estas tre bone aranĝita kun la haroj. Mi scivolas, ĉu ŝi ne frostos tiel ekstere, kiam ni iros al la restoracio?
- D – Ŝi havas ankaŭ pelerinon, mallongan kun fela strio sube kaj ĉe la kolo. Mi vidis tion, kiam ŝi alvenis. Sed la sandaloj jam ne taŭgas en tia vetero.
- E – Ankaŭ Karlo aspektas nekutime elegante! Ha ha, mi ankoraŭ neniam vidis lin en smokingo.
- D – Li montriĝis ĉiam en ĉifonaj ĝinzoj, kaj nigra subĉemizo somere, en vastega pulovero kun kapuĉo vintre. Nun mi apenaŭ rekonis lin, en la nigra smokingo kun bantkravato. Cetere, smokingo estas laŭ mi tro formala, malgaja. Li povintus surhavi kompletan el griza aŭ blua lana ŝtofo kun veŝto kaj konvena kravato. Mi povus imagi eĉ, ke anstataŭ veŝto kaj zono, surhavi alikoloran ŝalon sur la talio. Tio nomiĝas “hispana zono”.
- E – Mi eĉ ne volas imagi, kiom multege kostis iliaj geedziĝaj vestaĵoj!
- D – Ĉiuj pecoj, krom la ŝuoj, estas pruntitaj, Paŭla diris tion al mi, sed eĉ tiel ili devis multon elspezi. Elza, ĉu vi rimarkis, kiom multaj rigardas nin? (*Flustre*) Nun ankaŭ tiu maljuneta virino tuj antaŭ ni...
- E – (*Same flustre*) – Verŝajne pro niaj vestaĵoj. Nia aspekto elstaras el la aliaj, ĝi estas eleganta kaj gaja. (*Pli mallaŭte*) Rigardu, kiel ŝi mem estas vestita, en senforma nigra





robo, kiel sako, apud la rubujo. Ŝi ne estas ankoraŭ tiom maljuna, kiel ŝi aspektas... En pli bona kostumo, kun mallonga hararanĝo, mi taksus ŝin ne pli ol 50-jaraĝa.

- D – Ha, jes! Multaj virinoj super 40 aŭ 50 jam tute ne zorgas pri sia aspekto!
- E – Mi aldonus, ne nur la maljunetaj virinoj, sed ankaŭ viroj. Tiuj eĉ malpli atentas pri si.
- D – Ankaŭ en mia oficejo la pli maljunaj kunlaborantinoj havas taŭzitan hararon, ĉiam la saman jupon, multfoje lavitan, senkoloran ĉemizon. Tiuj tamen mallaŭdas la gejunulojn pro la minijupo, adhera pantalono, dekoltita T-ĉemizo... Terure! Mi esperas, ke mi neniam fariĝos tia, kiel ili, kiam mi maljuniĝos.
- E – Ankaŭ mi... Ĉu vi rimarkis, kiel ŝi rigardas nin, kvazaŭ... Tiaj malŝatas nin, junulojn, kaj envias nin!
- D – Atentu! (*Tre mallaŭte flustras:*) Nun ŝi flustras ion al la apuda ulo, tuj antaŭ vi... al tiu, kun barbo.
- VB – (*Turninta sin malantaŭen al Dora kaj Elza, mallaŭte, sed bone kompreneble:*)
– Fraŭlinoj, vi du senĉese babilas, jam ekde la komenco de la geedza ceremonio. Ĉu vi supozas, ke tio interesas ĉi tie iun ajn, krom vi? Ni alvenis por aŭskulti ne vin, sed la ceremonion! Nia filo, Karlo, nun edziĝas, kaj tiu evento estas por ni multe pli grava, ol via teda babilado! Vi ĝenas ne nur nin, sed ankaŭ aliajn gastojn! Kion vi imagas pri vi! Se tio ne interesas vin, vi rajtas senbrue foriri!

Vortklarigoj:

Taŭga: laŭcela, konvena. **Bunta:** havanta plurajn kolorojn. **Elmodiĝas:** eliras el la nedaŭra kutimo rilate al vestoj, sed ankaŭ el aliaj aferoj, kiuj rapide ŝanĝiĝas. **Flam-ruĝa:** koloro simila al hela brilo de

brulantaj gasoj en fajro. **Mod-prezentado:** prezento de la plej novaj vestaĵoj, de iu certa, aŭ pluraj vestaĵo-produktantoj.

Dekoltita, dekoltajo: tajli la vestaĵon tiel, ke la gorĝo, dorso, brusto, ŝultro (almenaŭ parte) ne estu kovrita. **Boat-forma:** laŭ formo de boato. **Talio:** ĉirkaŭo de la homa korpo ĉe nivelo de koksoj. **Ceremonio:** festo por speciala religia aŭ publika okazo. **Smokingo:** eleganta, formala vira jaketo. **Bantkravato:** vira koltuko kun ornama nodo. **Taŭzita:** malordigita, se temas pri hararo: ne kombita. **Flustri:** paroli subvoĉe (por ke ne ĉiuj aŭdu). **Rubujo:** ujo, en kiun oni metas forjetaĵojn. **Adhera vestaĵo:** vestaĵo agluliganta al la korpo. **Modelo:** objekto (vesto, vestaĵo), farita por esti imitata.

Taskoj:

- Kolektu la diversajn kolorojn el la dialogoj kaj aldonu 7 pliajn kolorojn (vi rajtas uzi vortaron)!
- Kolektu ĉiujn vestaĵojn el la dialogoj, kaj aldonu 5 pliajn! Parigu ilin kun diversaj koloroj!
- Kolektu la vestajmaterialojn el la dialogoj! Aldonu 3 pliajn kaj aldonu





al ili kolorojn kaj vestaĵojn!

- ĉ) Priskribu, kiel vi nun estas vestita! Ne forgesu pri la ŝtofoj kaj koloroj, kaj aldonu ankaŭ kiajn ŝuojn vi surhavas!

II. Verku dialogojn (proksimume en 8-14 frazoj):

- a) Vi estas en vestaĵvendejo, kaj volas aĉeti ĉemizon (puloveron). Demandu al la vendist(in)o, ke li (ŝi) proponu al vi iun, diru, kiun koloron kaj formon vi deziras. Indiku ankaŭ la grandecon!
- b) Via amik(in)o petas helpon de vi por aĉeti ŝuojn (sandalojn, sportajn ŝuojn) interrete, sed li (ŝi) ankoraŭ neniam butikumis tiel. Li (ŝi) eĉ ne scias, kiu grandeco estas taŭga. Helpu lin (ŝin)!
- c) Vi estas en meblovendejo, kaj volas aĉeti kelkajn kusenojn por via nova helgriza kanapo. Vi ankoraŭ ne scias precize, kiu koloro plej konvenas por la kanapo kaj por via ĉambro. Petu helpon de la vendist(in)o!

III. Verku leterojn, en kiuj:

- a) Vi rakontas al via amik(in)o, ke viaj komunaj geamikoj geedziĝis. Rakontu detale (en proksimume 16–20 linioj), kiel ili ambaŭ estis vestitaj, kia estis la ceremonio, kaj la posta festo! Ne forgesu pri la “devigaj” formalajoj de la letero: dato, alparolo, adiaŭo, ktp!
- b) Vi informas vian amik(in)on, ke vi havis la bonŝancon ricevi inviton al modprezentado. Rakontu detale (en proksimume 16–20 linioj), kiaj modeloj estis prezentitaj, kiaj estis la vestaĵoj! Menciuj la formojn, la ŝtofojn, la kolorojn, kaj kie, kiam eblas porti ilin! Ne forgesu aldoni vian propran opinion pri la plej nova modo, kaj ĉu indas kaj kiel sekvi la modon! Same ne forgesu pri la “devigaj” formalajoj de la letero: dato, alparolo, adiaŭo, ktp!

Mireille Grosjean



Kiom stultan ideon mi havis...

Ne seriozaj junaj virinoj

Kiam mi finis la liceon, kiam mi fariĝis bakalaŭro, mi havis longajn feriadojn pro la fakto, ke la liceo finiĝis fine de Junio kaj ke la universitato komenciĝis en Oktobro. Tiam mi havis la eblon vojaĝi al Madrido. Amikino loĝanta tie invitis min. Do komence mi devis arigi monon por pagi tian vojaĝon: mi laboris en fabriko. Mi uzis noktan trajnon por atingi Barcelonon kaj poste denove trajnon por atingi Madridon. Sola.

Dum mia restado en Madrido mia amikino kaj mi decidis viziti la urbon Toledo. Ni prenis busbileton por tuttaga ekskurso. Dum la veturado ni abunde babilis en la franca. Ni rimarkis tute malantaŭe en la buso junan religiulon, ĉu pastro, ĉu monaĥo... – foje ni parolis pri li kaj komentis lian aspekton.


Dum la reveno iam mi demandis al mia amikino:

Kioma horo estas? Kaj ni aŭdis nekonatan voĉon, kiu respondis en perfekta franca lingvo:

Estas la kvina. Temis pri la juna religiulo. Tiam ni konstatis, ke li povis aŭskulti kaj kompreni ĉiujn niajn knabinecajn diraĵojn...



Mezvoje inter utopio kaj realismo



Komentoj pri “La Timulo” de Pál Békés (elhungarigo de Lenke Szász, ilustraĵoj de Yentl-Rose Hemelrijk, eldono de Dokumenta Esperanto-Centro Ĝurdevac, 2023).

Ĉi tiu bela libro estas humura kaj samtempe profunda meditado pri ekvilibra sinteno inter revemo kaj realemo.

Temas pri fabelo plena je alegorioj kaj simboloj, kiujn la leganto povas interpreti diversmaniere, depende de sia aĝo kaj de siaj vivospertoj. Ĉiuj roluloj loĝas en malgranda arbareto kaj havas malcertan identecon. Ili ŝajnas esti koboldoj, diversaspektaj kaj havantaj diversajn karakterojn, eventuale parte similtantaj diversajn arbarajn bestetojn. La sola rolulo kies identeco klaras estas la poŝtisto (iu birdo prezentita antropomorfe), sed ties rolo malgravas en la rakonto. La malcerteco koncerne la identecon kaj la aĝon de la ĉefaj roluloj permesas grandan liberecon de interpretado al legantoj. La ĉefa rolulo estas ulo kiu je certa momento en sia vivo komencis suferi pri grava krizo de paniko, kiu igis lin izoliĝi de ĉiuj siaj antaŭaj amikoj. Li enŝlosis sin en sia loĝejo ene de arbotrunko, fariĝis suspektema pri ĉio ajn kaj ĉiu ajn, perdis apetiton, perdis intereson pri legado kaj eĉ pri sia propra sano. La loĝantoj de la arbaro anstataŭigis lian nomon per la kromnomo “Timulo”, kaj dum 7 jaroj ne plu sukcesis havi ajnan kontakton kun li. Antaŭ la krizo, Timulo estis amikema kaj babilema, kutimis regali siajn amikojn per bongusta teo, voĉlegante aŭ rakontante fascinajn fabelojn, en kiuj la bono ĉiam venkis la malbonon. Kio kapablis tiom draste ŝanĝi la konduton de normala kaj afabla estaĵo?

Ĝen kio. Iom post iom, la trankvilan mondon de tiuj loĝantoj komencis hanti monstroj, kiuj malordigis kaj malbonigis ĉies vivojn. Samkiel en fabeloj, memfidaj kavaliroj iris batali kontraŭ la monstroj kaj trairis la arbareton rajdante belajn ĉevalojn, portante ŝildojn kun aŭdacaj devizoj, kiel ekzemple: *“Neniam nin regos despotismo draka!”* Tamen, malkiel en fabeloj, la kavaliroj neniam revenis venkantaj, dum la monstroj plimultiĝis ... La ĉefa rolulo de la libro perdis iom post iom sian fidon ke la bono ĉiam venkas la malbonon, ĝis li ne plu kapablis elĉerpi esperon kaj kuraĝon el utopiaj rakontoj, kaj ne plu havis forton ĝui la realan vivon. Lia timo atingis paroksismon, kiam li ricevis leteron de sia plej bona amiko Vagulo, kiu konfirmis la plej nigrajn timojn de la arbaretanoj. Tiu 6 strofa arteca poemletero priskribis la ekster-arbaretan mondon kiel modernan distopion*, en kiu la monstroj jam malordigis, malpurigis, detruis kaj malbeligis ĉion. Mi citas la lastajn strofojn: *“Ĉi tie ĉio ŝanĝiĝis,/ eĉ la aero malpuras./ Birdoj sur teron falas,/ flamaj riveroj forkuras.// Ĉi tie ĉio ŝanĝiĝis,/ kanto arbaron ne skuas./ Konsolo, espero mankas,/ kaj monstroj diboĉe bruas.”* Ŝajnas ke la letero intence priskribis troigitan raporton pri la eksterarbara mondo, por timigi la arbaretanojn.

La libro prezentas humure kaj sprite la aventurojn de Timulo, kiu post 7 jaroj de izoliĝo forlasas la arbareton kaj iras renkonti la monstrojn, sen suspekto ke ĝuste lia eksa plej bona amiko Vagulo jam fariĝis monstro, apartenanta al la plej danĝera specio: specio homaspekta! La hipokrita Vagulo, ruze sukcesas konvinki lin fariĝi mem monstro, por ke tiamaniere savu sian karan bibliotekon. Gravus en

**) Distopio: malo de utopio, do atentigas pri eventuala terura kaj malespera mondo.*



tiu rakonto la fakto, ke ĝuste la granda biblioteko de fabeloj konservita de Timulo en sia hejmo estas la plej granda minaco por la vivoj de monstroj. Sen utopiaj revoj, la reala mondo malpliboniĝas ĉar la monstroj prosperas.

La kontaktoj de Timulo kun diversspecaj alegoriaj monstroj* estas plenaj je surprizoj por la leganto. La ilustraĵoj (kreitaj speciale por tiu ĉi eldono de la esperantista nederlanda grafikistino Yentl-Rose Hemelrijk) aldonas ĉarmon kaj humuron al tiuj surprizoj. Inter la multaj alegoriaj monstroj de la libro, min impresis precipe la nevidebla monstro nomita Interna Malpleno. Kvankam tiu surdige bruas en la cerbo de Timulo, tiu ĉi sukcesas venki ĝin eĉ sen ajna strategio, nur murmurante (laŭ instinkto kaj pro terura timo!) malnovan porinfanan kanteton. Evidentiĝas ke la tiel nomata Interna Malpleno restas fakte ekstere ĝis ĝi neniĝas, ĉar ĝi ne povas enigi animon jam plen-plenan je muziko! Fin-fine, Timulo alvenas al la saĝa konkludo ke *“La mondo plenas je monstroj, ĉar estas facile monstriĝi. Tre facile. Malfacilas ne fariĝi monstro.”* Tiu kompreno kuracas definitive la panikon de Timulo. Li revenas al sia arbareto, kie lian bibliotekon jam bruligis Vagulo. Sed la libroj daŭre ekzistas en la memoro de Timulo, do tiu denove rakontas ilin... kaj okazas miraklo, kiel en fabeloj: la eta mondo de la arbareto iom post iom normaliĝas kaj iĝas fortikaĵo de kontraŭmonstra rezisto! La libro finiĝas tiel: *“Kaj Timulo daŭrigis rakonti fabelon, la novan historion. Ĝi temis pri tio, kiel Timulo por ĉiam fariĝis Vivulo.”*

Kvankam la aŭtoro ne diras klare ke la timo mem povas fariĝi danĝera monstro, la leganto sentas tion la tutan tempon. Rakontante la heroecan lukton de Timulo por venki sian paroksisman** timon, Pál Békés realigas ankaŭ belan pledon por ekvilibro en la vivo. Ĉar la aventuroj de Timulo okazas paralele kun tiuj de siaj malprudentaj geamikoj, kiuj intertempe estis venkitaj de senhontaj monstroj damaĝantaj iliajn vivojn. Do, evidentiĝas ke ne nur ekstrema timo, sed ankaŭ ekstrema

*) *Alegorion oni uzas klarigante ion abstraktan per bildo.*

malprudento (manko de timo) povas fariĝi danĝera. Jen kion asertas la ĉefa rolulo de la rakonto pri la monstroj: *“Bedaŭrinde, ili estas nevenkeblaj. Sed... oni povas distancigi ilin.”*

Pál Békés uzas multajn amuzajn esprimojn en la rakonto, aludante pri diversaj hungarlingvaj proverboj kaj eldiroj, kiujn li alformas laŭ la bezonoj de la teksto. Iuj proverboj ekzistas ankaŭ en aliaj eŭropaj lingvoj kaj kelkaj el ili eniris eĉ la Proverbaron de Zamenhof. La tradukistino lerte trovis humurajn ekvivalentojn en Esperanto por multaj vortludoj. Ĉar mi tute ne konas la hungaran, mi kolektis kelkajn informojn pri tiaj aludoj de la tradukistino mem. Jen ekzemplo de tia aludo kiu plej amuzis min: *“Monstro al monstro okulojn ne pikas”* — el la hungara (kaj Zamenhofs) proverbo *“Korvo al korvo okulojn ne pikas”*. Jen alia lerte rimigita aludo al hungara popolkanto: *“Kiu monstro volas esti, en infero devas festi”*. Por ke la leganto komprenu ankaŭ la ĉirkaŭtekston de tiu frazo, mi citas laŭvortan elhungarigon de la tuta concerna strofo, tiel kiel Lenke Szász sendis al mi: *“Kiu volas fariĝi sakŝalmisto,/ Tiu devas iri en inferon,/ Tie li devos ellerni/ Kiel ludi la sakŝalmon.”* Estas ege komike, ke ĝuste tiujn vortojn uzis Interna Malpleno, antaŭ ol ĝi estis neniigita pere de iu... kanteto! Do la monstro tiom pritimis muzikon, ke ĝi jam obsedis pri muziko eĉ antaŭ ol alfronti sian venkonton!

Mi opinias, ke tiu ĉi libro bele zorgita de la eldonisto Josip Pleadin estas taŭga fonto de meditado por esperantistoj, ĉar la Movado estas ĉiam klopodanta trovi la ekvilibron inter revemo kaj realemo. Zamenhof esperis, ke la Movado fariĝu fidinda fortikaĵo kontraŭ Maljusteco, Mensogo, Interreta Malamo, Krueleco kaj aliaj “monstroj”. Kaj la esperantista komunumo ja sukcesis ĝis nun venki multajn ege malfacilajn historiajn cirkonstancojn. Ni esperu ke ankaŭ estonte ĝi sukcesos konservi tiun “kontraŭmonstran” tradicion.

***) *Paroksismo estas*

eksploda kulmino, erupcio.

Luiza Carol



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka
malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin pri fremda lingvo. La laboro kun kanto sentigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi invitas vin en esceptan kaj magian mondon de “Verda Cirko”. Vortojn de tiu kanto kune skribis José de Jesús Campos Pacheco el Kubo kaj Luiza Carol el Israelo, kiu ankaŭ skribis muziknotojn.

La bildon al la kanto desegnis 9-jara lernantino de la desegna kurso, Alexia Camila Santana Munive.



Ĉu vi iam vizitis cirkon? Ĉu al vi plaĉis cirka spektaklo? Ĉu vi ŝatas cirkajn klaŭnojn?

Verda Cirko

*Verda Cirko, Verda Cirko!
Ni atendas vin ĉe nia urbo!
Ni esperas ridojn kaj multajn kantojn aŭdi,
ni esperas ĉiuj tutkore tuj aplaŭdi
kune kun samurbaj infanoj
kaj kune kun foraj samideanoj.*

*Ni antaŭĝojas pri via vizito,
vi ĉiam estas vere bonvena ĉe ni,
Verda Cirko! Verda Cirko!
Verda Cirko! Verda Cirko!*

*Verda Cirko, Verda Cirko!
Ni atendas vin ĉe nia urbo!
Ni atendas blankajn kolombojn el ĉapeloj,
ni atendas hundojn dancantajn sur kameloj,
serĉojn plenajn je fantazio,
ni atendas ĉarmon de iluzio.*

*Ni antaŭĝojas pri via vizito,
vi ĉiam estas vere bonvena ĉe ni,
Verda Cirko! Verda Cirko!
Verda Cirko! Verda Cirko!*

*Vi ĝojigas nian serĉeman rondon,
ĉar ni amas vian magian mondon,
kie kolomboj tre lerte kalkulas,
kie simioj komike rolludas,
kie ĉevaloj gracie ekdancas,
kie papagoj ekfajfas kaj kantas,
kie la klaŭnoj kun ĝoj' transkapiĝas
kie neniu el ni enuiĝas,
kie neniu el ni enuiĝas.
Verda Cirko!*

*Ni antaŭĝojas pri via vizito,
vi ĉiam estas vere bonvena ĉe ni,
Ni amegas vian magian mondon,
Verda Cirko!*

Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo: *malgosia.junaamiko@gmail.com*

Vortoj: JesúS Campos Pacheco
kaj Luiza Carol

Verda Cirko

Melodio:
Luiza Carol

C F C

ver-da cir-ko ver - da cir-ko ni a-ten-das vin ĉe ni-a ur-bo

5 Bb F

ni es - pe - ras ri - dojn kaj mul - tajn kan - tojn aŭ - di

7 Bb

ni es - pe - ras ĉi - ujn tut - ko - re tuj a - plaŭ - di

9 Gm C Bb

ku - ne kun sam - ur - baj in - fa - noj kaj ku - ne kun fo - raj
ser - ĉojn ple - najn je fan - ta - zi - o kaj ni a - ten - das ĉar - mon

12 F F Bb

sam - i - de - a - noj ni an - taŭ - ĝo - jas pri vi - a vi - zi - to vi ĉi - am es - tas ve - re bon -
de i - lu - zi - o

17 F

ve - na ĉe ni ver - da cir - ko ver - da cir - ko ver - da cir - ko ver - da cir - ko

23 Bb Eb Cm Bb

vi ĝoj - i gas ni - an ser - ĉe - man ron - don ĉar ni a - mas vi - an ma - ĝi - an mon - don

27 **Pli rapide** F Bb

ki - e ko - lom - boj tre ler - te kal - ku - las ki - e si - mi - ojn ko - mi - ke rol - lu - das
ki - e ĉe - va - loj gra - ci - e ek - dan - cas ki - e pa - pa - gojek - faj - fas kaj kan - tas

31 Eb Bb

ki - e la klaŭ - nojn kun ĝoj' trans - ka - pi - ĝas ki - e ne - ni - u el ni e - nu - i - ĝas

Reveno al la antaŭa takto

35 Eb Bb F F

ki - e ne - ni - u el ni e - nu - i - ĝas ver - da cir - ko ni an - taŭ - ĝo - jas pri

39 Eo F

vi - a vi - zi - to ni ĉi - ujn a - mas vi - an ma - ĝi - an mon - don ver - da cir - ko

Mireille Grosjean

Legu kaj ordigu!


Tia ekzercotipo aperas ofte en *Juna Amiko*, ĉar ĝi estas ege postulema. La lernantoj (plej bone en grupoj) devas kompreni ĉiun vorton kaj observi la tension de la verboj por ĝuste vicigi la frazojn.

Okaze de kurso pri instruado en Aruŝa, Tanzanio, dum Universala Kongreso de Esperanto en Aŭgusto 2024, mi petis la partoprenantojn (kelkaj estis eĉ komencantoj en la lingvo), ke ili kreu iun tian tekston. Ili verkis la solvon. Mi nun preparis la miksitajn frazojn. Legu kaj ordigu!

Jen la ekzemplo:

Pluvo

1. Vidante la pluvon, li decidis kunporti pluvombrelon.



2. Reveninte hejmen, li surmetis sekajn pantoflojn.
3. Frumatene la pluvo komencis fali.
4. La pluvakvo ne malsekigis lin, sed liajn ŝuojn.

Solvo

Frumatene la pluvo komencis fali. Vidante la pluvon, li decidis kunporti pluvombrelon. La pluvakvo ne malsekigis lin, sed liajn ŝuojn. Reveninte hejmen li surmetis sekajn pantoflojn.

Homoj eklernas Esperanton

1. Finfine ili scipovis la lingvon kaj registriĝis al la Universala Kongreso okazonta en Tanzanio.
2. Sekve de tio ili decidis serĉi instruiston kaj lernolibrojn.
3. Nuntempe ili ĝuas la agrablan etoson kaj rondon kiel kulturkunvenon de Esperanto, kiu okazas unufoje jare ie en la Mondo.
4. Homoj el diversaj landoj aŭdis kaj interesiĝis pri la lingvo neŭtrala en la pasintaj jaroj.

Solvo

Homoj el diversaj landoj aŭdis kaj interesiĝis pri la lingvo neŭtrala en la pasintaj jaroj. Sekve de tio ili decidis serĉi instruiston kaj lernolibrojn. Finfine ili scipovis la lingvon kaj registriĝis al la Universala Kongreso okazonta en Tanzanio. Nuntempe ili ĝuas la agrablan etoson kaj rondon kiel kulturkunvenon de Esperanto, kiu okazas unufoje ie jare en la Mondo.

Al la kongresejo

1. Aliajn programojn li ne ĉeestis.
2. Li promenis al la kongresejo.
3. Kiam li estis en la ejo, li ne sufiĉe



kapablis trovi la salonojn.

Solvo

Li promenis al la kongresejo. Kiam li estis en la ejo, li ne sufiĉe kapablis trovi la salonojn. Aliajn programojn li ne ĉeestis.

Manĝi, aĉetumi kaj io pli

1. Ili interparolis tre ĝoje.
2. Reveninte hejmen, li surmetis sekajn pantoflojn kaj la tagmanĝo estis preparita.
3. En la superbazaro li hazarde renkontiĝis kun sia malnova amiko.
4. Manĝinte sian tagmanĝon, li iris al superbazaro kun sia edzino por aĉetado.

Du eblaj solvoj

Reveninte hejmen, li surmetis sekajn pantoflojn kaj la tagmanĝo estis preparita. Manĝinte sian tagmanĝon, li iris al superbazaro kun sia edzino por aĉetado. En la superbazaro li hazarde renkontiĝis kun sia malnova amiko. Ili interparolis tre ĝoje.

Reveninte hejmen, li surmetis sekajn pantoflojn kaj la tagmanĝo estis preparita. Manĝinte sian tagmanĝon, li iris al superbazaro kun sia edzino por aĉetado. Ili interparolis tre ĝoje. En la superbazaro li hazarde renkontiĝis kun sia malnova amiko.

Historio de Johano

1. Johano vekiĝas je la sepa, li lavas sin kaj li vestiĝas.
2. Johano iras piede al la lernejo.
3. Je la sesa matene la patrino kuiras rizon, pretigas teon kaj oranĝosukon.
4. Johano ricevas matenmanĝon kaj dankas sian patrinon.

Solvo

Je la sesa matene la patrino kuiras rizon, pretigas teon kaj oranĝosukon. Johano vekiĝas je la sepa, li lavas sin kaj li vestiĝas. Johano ricevas matenmanĝon kaj dankas sian patrinon. Johano iras piede al la lernejo.

Mi lernu Esperanton !

1. Baldaŭ estos la fino de la kurso kaj mi trapasos ekzamenon.

2. Mi volas lerni Esperanton kaj aliĝis al Esperanto-kurso.

3. Mia instruisto, kiu nomiĝas Jayrous, nun instruas al ni la akuzativon.

4. Ĉiusabate mi partoprenas la Esperanto-kurson en nia klubejo.

Solvo

Mi volas lerni Esperanton kaj aliĝis al Esperanto-kurso. Ĉiusabate mi partoprenas la Esperanto-kurson en nia klubejo. Mia instruisto, kiu nomiĝas Jayrous, nun instruas al ni la akuzativon. Baldaŭ estos la fino de la kurso kaj mi trapasos ekzamenon.

Kongreso

1. Je la tria de aŭgusto komenciĝis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto.
2. Hodiaŭ la 8-an ni partoprenas en la trejnseminario de instruistoj gvidata de Mirejo.
3. La organizanto malfermis la kongreson: multe da gepartoprenantoj sin prezentis.
4. Ĉiutage okazas multaj kaj malsamaj kunsidoj.

Solvo

Je la tria de aŭgusto komenciĝis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto. La organizanto malfermis la kongreson: multe da gepartoprenantoj sin prezentis. Ĉiutage okazas multaj kaj malsamaj kunsidoj. Hodiaŭ la 8-an ni partoprenas en la trejnseminario de instruistoj gvidata de Mirejo.

Ekskurso

1. Ni alivestis nin, ĉar ni deziris naĝi.
2. Post la naĝado ni per buso reveturis al Aruŝo.
3. Hieraŭ ni ekskursis per buso. Ni veturis al banejo.
4. Ni havis multe da plezuro naĝante.


Solvo

Hieraŭ ni ekskursis per buso. Ni veturis al banejo. Ni alivestis nin, ĉar ni deziris naĝi. Ni havis multe da plezuro naĝante. Post la naĝado ni per buso reveturis al Aruŝo.



El mia kolora vivo


Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Kion vi vidas sur la bildoj?
Kiom da diferencoj en la du bildoj vi trovis?

Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto

La rubrikon prizorgas: **Mónika Molnár**




La arbfolioj ŝanĝis siajn kolorojn, la somero klare transdonis la lokon al la aŭtuno, sed la suno ankoraŭ milde karesis la florojn, la bestojn kaj ankaŭ la ruĝajn vizaĝojn de niaj uletoj, kiuj post la lernejo gaje, konkure kuris ĝis la hejmo. Ili estis gajaj, ĉar estis plezuro trovi iliajn kamaradojn en la lernejo post la someraj ferioj kaj ili kuris, ĉar ili bone sciis, ke Avinjo certe preparis por ili bongustajn manĝaĵetojn hejme. Ĉiuj estis feliĉaj. Aŭ... preskaŭ ĉiuj... Zorgemulido kvankam kuris kun la aliaj, sed li ne estis gaja. Li havis zorgojn.

– Kio okazis al vi, Zorgemulido? – demandis Lernemulido. – Ĉu mi povas helpi vin?

– Dankon, sed mi ne pensas, ke vi povus helpi min. Al mi okazis nenio. Sed la problemo estas, ke mi ne scias kio okazis al Tutu, al mia katido! Hieraŭ vespere mi ne vidis ĝin. Avinjo diris, ke tio ne tro gravas, tio okazas al katoj. Sed ankaŭ matene mi ne vidis ĝin... Kaj... Nu... Mi zorgas pri ĝi...

– Mi komprenas vin, sed mi pensas, ke Avinjo pravas. Vi vidos, Tutu baldaŭ revenos kaj kiu scias kion ĝi rakontus al vi, se ĝi kapablas paroli! Ĉu vi scias, ke katoj havas ankaŭ sekretajn vivojn? Mi scias tion, ĉar mi legis la rakonton de Ema Faugère [‘ema fojer’] pri la familio Kato! Aŭskultu ĝin!



Ema Faugère:
La familio Kato

En la familio Kato, kiam la katoj estas tre lacaj, ili iras en la litojn. La katoj estas malgrandaj, sed iliaj litoj estas vere grandaj kaj komfortaj.

Tutu ne estas tre laca, do li ne volas dormi. Tutu iras en la arbaron por ludi. Li vidas belajn fruktojn kaj li diras: „Njam-njam!”



Tutu saltas de la balancilo kaj manĝas la rozkolorajn fruktojn. Ankaŭ Kato Panjo foriris de la domo. Ŝi estas ĉe la frizisto. Revenante de la frizisto, ŝi vidas hundon.



La hundo estas tre malĝentila, sed ĝi diras al Kato Panjo: „Mi estas ĝentila. Tre ĝentila!” „Bone, bone...” – diras Panjo iom hezite kaj ŝi rapide iras hejmen.



Ŝi renkontas... „Saluton, malgranda Tutul!” „Ne! Mi estas granda Tutul!” „Haha, bone!” Ili iras hejmen kune. En la domo Tutu volas manĝi tomaton kaj kanti inventitan kanton.



„Panjo, kantu kun mi: 'La hundo-monstro estas ĝentila!' Bonvolu ripeti! Estas mi, kiu inventis ĝin!” „Ne! Mi ne volas!” – diras Panjo. „Sed venu, Lulu serĉas nin!” Kaj tiel Lulu, la frato, retrovis Tutun kaj Panjon.



Kiam vespere la familio Kato retroviĝis, ili manĝis multajn tomatojn, ĉar ili tre ŝatis la tomatojn. Pro la bela vetero, ili decidis dormi ekstere, subĉiele kaj ili vidis dek unu belegajn falantajn stelojn.

– Do, ĉu vi vidas? – demandis la uleto sian amiketon. Ni ne ĉiam scias kion faras la katoj dum la tagoj, sed ili ĉiam revenos al la hejmo, kie oni amas ilin. Kaj Tutu scias, ke vi tre amas ĝin! Venu, eble ĝi estas jam hejme pli frue ol ni!

La ulidoj rekomencis kuri sen halti ĝis la hejmo. Sed pro la diskuto, ili perdis iom da tempo kaj la aliaj jam alvenis antaŭ ili kaj sidis ĉe la tablo kun tre bongustaj kuketoj, biskvitoj, fruktosukoj. Kutime ili havis ankaŭ kakaon, sed hodiaŭ ĝi mankis sur la tablo.

Avinjo pardonpete klarigis tion al ili: – Mi bedaŭras, ke mankas la kakao, sed kiam Tutu revenis hejmen, ĝi fortrinkis

ĉiun lakton! Mi ne scias kie ĝi estis, sed mi scias kie ĝi estas nun: ĝi profunde dormas en sia korbo! ©

Verda Cirko 4

Spektaklo en malsanulejo

Vespere, en la domo de Avino.

Reĉjo: Avino, kion vi faras?

Avino: Mi devas finkudri tiujn vestaĵetojn, poste ni enlitiĝu.

Reĉjo: Sed ili estas malgrandaj. Ĉu ili estas por la pupetoj de Manjo?

Avino: Ne. Ili estas por gantopupoj. Mi kudras ilin por spektaklo kun gantopupoj, kiu okazos por geknaboj en malsanulejo. Mi kunlaboras kun la estro de la pupteatro, kudrante tiujn vestaĵetojn.

Reĉjo: Ĉu vere okazos pupspektaklo en malsanulejo?!

Avino: Jes, gantopupistoj rolludos tie por amuzigi malsanajn geknabojn. Klaŭnoj kaj magiistino de Verda Cirko ankaŭ partoprenos... Ili invitis ankaŭ nin partopreni la spektaklon. Vi povos ludi vian bekfluton...

Reĉjo: Mi volonte ludos bekfluton tie. Mi pensas, ke ankaŭ Manjo povas iri al la spektaklo kaj donaci belajn desegnojn al la malsanaj geknaboj tie. Manjo desegnas bele. Morgaŭ mi retumos kun ŝi por inviti ŝin partopreni tiun eventon.

Avino: Mi forgesis sciigi vin, ke la spektaklo okazos dimanĉe je la 2-a posttagmeze. Mi bakos kukojn kaj preparos oranĝsukon por tiu evento. *(Paŭzeto.)* Jen, mi jam finkudris la lastan vestaĵeton por birda pupo... Nun ni enlitiĝu, Reĉjo.

Dimanĉe en la malsanulejo je la 2-a posttagmeze.

Avino: La pupspektaklo tuj komenciĝos.
Reĉjo: Mi antaŭĝojas ludi bekfluton... Jen Manjo kunportas siajn desegnojn...

Minutojn poste. La pupistoj rolludas per gantoj, kiuj enkorpiĝas: Ruĝan Rozon, Birdon kaj Oranĝbranĉon.

Oranĝbranĉo: Saluton al ĉiuj! Ni venis ĉi tien por ĝojigi kaj kuraĝigi la malsanajn infanojn. Kara Ruĝa Rozo, bonvolu rakonti al la infanoj kial vi alvenis ĉi tien.

Ruĝa Rozo: Mi venis, ĉar mia patrino, Bonodora Rozujo, pensas ke ĉiuj infanoj estas bonkoraj kaj zorgas pri floroj.

Oranĝbranĉo: Ĉu Bonodora Rozujo konis multajn infanojn?

Ruĝa Rozo: Jes, ŝi konis multajn lerneĵanojn, kiuj akvumis ŝin ĉiutage. Pasintsomere estis tre varme kaj ne sufiĉe pluvis, tial mia patrino malsaniĝis. Vi verŝajne scias, ke neniu floro povas vivi sen akvo. Kvankam infanoj feriiis dum la somero, ili venis ĉiutage en la lerneĝardenon por akvumi la florojn.

Oranĝbranĉo: Ho, kiom bela agado! Mi komprenas, ke ili kuracis vian patrinon pere de akvo, samkiel la kuracistoj estas kuracantaj homojn pere de medikamentoj aŭ vitaminoj, ĉu ne?





Ruĝa Rozo: Jes, ĝuste tiel.

Birdo: Kaj ĉu tiuj ĉi infanoj estas ĝuste la samaj infanoj kiuj kuracis vian patrinon?

Ruĝa Rozo: Ne gravas ĉu ili estas ĝuste la samaj. Ĉiuj infanoj amas florojn kaj pretas zorgi pri ĝardenoj, ĉu ne? Ĉu ne? Ĉu ne?

Birdo: Jes... jes...

Ĉeestantoj: Jes... jes...

Ruĝa Rozo: Kompreneble! Do ĉiuj infanoj meritas la dankemon de la floroj, ĉu ne? Tial, Bonodora Rozujo sendis min ĉi tien por gajigi vin pere de mia kantado.

Birdo: Ho! Ĝuste por la sama kialo ankaŭ mi troviĝas ĉi tie. Ankaŭ mi volas kanti por la infanoj por montri mian dankemon. Kiam mi estis malsana kaj ne kapablis flugi, iu knabo flegis mian flugilon kaj nutris min, ĝis mi saniĝis. Nun mi certas, ke ĉiuj infanoj pretas helpi malsanajn birdojn, ĉu ne? Ĉu ne?

Ĉeestantoj: Jes... jes...

Birdo: Do mi estas danka al ĉiuj infanoj kaj venis ĉi tien por kanti iun ĝojigan kanton.

Ruĝa Rozo: Do, ni kantu nun.

Ili kantas ĉu kune, ĉu iu post la alia.

Oranĝobranĉo: Nun, mi rakontos pri io, kio okazis al oranĝujo. Aŭskultu!

Birdo: Silentu! Oranĝobranĉo rakontos ion. Ni aŭskultu rakonton!

Ruĝa Rozo: Sst! Ni aŭskultu la rakonton de Oranĝobranĉo!

Oranĝobranĉo: Estis malvarma vintro...

Birdo: (*Tremas*) Brrr...

Oranĝobranĉo: Estis forta pluvo...

Ruĝa Rozo: (*Tremas*) Brrr...

Oranĝobranĉo: Forta vento blovis: ...
Uuuu...

Ruĝa Rozo: (*Tremas*) Brrr...

Oranĝobranĉo: Eĉ blovegis: Uuuu Uuuu
Uuuu...

Birdo: (*Tremas*) Brrr...

Oranĝobranĉo: La vento faligis junan maldikan oranĝujon kaj rompis ĝiajn branĉojn...

Birdo: Ho ve!!

Oranĝobranĉo: La oranĝujo preskaŭ mortis!

Birdo kaj Ruĝa Rozo: Ho ve!!

Oranĝobranĉo: Sed la sekvan tagon venis knabo, kiu metis apogilon al la juna oranĝujo. Li paciencie zorgis pri la sano de la oranĝujo, dum kelkaj jaroj. Tiu oranĝujo saniĝis, kreskis forta, ĝoja kaj fruktodona. Nun ĝi donas multege da oranĝoj. Ĝi estas danka al tiu knabo, kaj ankaŭ al ĉiuj infanoj, ĉar ĉiuj infanoj kapablas kaj pretas protekti la arbojn, ĉu ne?

Ruĝa Rozo: Kompreneble!

Ĉeestantoj: Kompreneble!

Oranĝobranĉo: Do la oranĝujo sendis min kun bongustaj oranĝoj por la infanoj! Jen la donacoj de la oranĝujo!

Oranĝobranĉo prenas teleron kun oranĝoj kaj donas oranĝojn al la ĉeestantoj.

La gantopupoj kantas kaj Reĉjo bekflutas. Geknaboj ridas kaj kantas.

Oranĝobranĉo: Nun rolludos klaŭnoj kaj magiistino.

Magiistino: El tiu magia ĉapelo aperos... aperos... Jen! Bombonoj kaj floroj!

La magiistino donacas florojn kaj bombonojn al la geknaboj.

Ruĝa Rozo: Aŭskultu! Mi scias iun sekreton, kiun eta papilio flustris al mi, antaŭ ol ĝi elflugis!

Ĉeestantoj: Kion? Kion vi scias?

Ruĝa Rozo: Mi scias, ke Manjo kaj Avino de Reĉjo donacos por ni belegajn desegnojn, kukojn kaj bongustan oranĝosukon!

La ĉeestantoj aplaŭdas. Ĉiuj ricevas la donacojn de Manjo kaj Avino.

Verkis: José de J. Campos Pacheco (Kubo)
kaj Luiza Carol (Israelo)
Bildo: Odelvis del Sol (Kubo)

109-a Universala Kongreso

Rezolucio de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio.

La 854 kongresanoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), venintaj el 65 landoj al Aruŝo, Tanzanio, inter la 3-a kaj 10-a de Aŭgusto 2024, traktis la temon “Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo”. La partoprenantoj de la kongreso ne nur diskutis la temon, sed samtempe prezentis modelon por pli bona mondo, en kiu homoj el multaj diversaj landoj povas pace kunvivi kaj interkomuniki sen tradukistoj per la internacia lingvo Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas.

Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Ĝi pruvis, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, estas vigla; ke ĝi aktivis en multaj landoj de la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.



**Aruŝo Tanzanio
2024**

**109-a
Universala Kongreso
de
Esperanto**

La kongresanoj alvokas al ĉiuj homoj protekti la medion, ĉar sana medio estas antaŭkondiĉo por atingi la celon konstrui pli bonan mondon. Ili alvokas al ĉiuj homoj de la tero konsideri utiligi dum vojaĝoj transportilojn, kiuj konsumas malpli da energio, prefere el daŭripovaj fontoj kiel suno aŭ vento, kaj kunlabori por kompensi la emision de forcejaj gasoj, kiam ankoraŭ ne eblas tion eviti.

La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, koresponde kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo. Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia

lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo. La kongresanoj konstatas kun ĝojo kaj fiero, ke ankaŭ en tiu ĉi kongreso evidentiĝas, ke Esperanto plene taŭgas por tiu celo.





Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Malgraŭ la malfacilaĵoj, sukceso...

Mi invitas vin al la bela itala urbo Montevarchi. Dank' al la itala esperantistino Brunella Moracci mi havis eblecon viziti la lokan Universitaton de la Tria Aĝo kaj Urban Bibliotekon.

La Universitato de la Tria Aĝo en Montevarchi estis fondita antaŭ dek jaroj de tri virinoj: Carla Bazzini, Cristina Palmieri kaj Ilda Galassini.

La fondintinoj kaj instruistoj (ĉirkaŭ 50 homoj) laboras kiel volontuloj, ĉiam



entuziasme plenumante siajn taskojn... Preskaŭ 300 studentoj profitas de la tre riĉa programo.

En la unua jaro de la funkciado de la universitato estis nur unu studentino, tiam 81-jaraĝa. Mi renkontis ŝin.

Malgraŭ la komencaj malfacilaĵoj, la fondintinoj de la universitato ne rezignis kaj kreis lokon plenan de pasio kaj inspiro. Ili atingis sukceson, ĉar ili ĉiam kredis je la praveco de siaj agoj, havis klare difinitan celon kaj konstante strebis al ĝi.

Unu el la studentinoj de la universitato, bibliotekistino Stefania Papi, invitis min al la Urba Biblioteko (*Ginestra Fabbrica della Conoscenza*). La nombro de kolektoj, la kataloga sistemo, temaj ĉambroj kaj la legejo faris al mi grandegan impreson. Inter multaj kolektoj troviĝis italaj eldonoj





de multaj polaj verkintoj, interalie de la nobelpremiito Olga Tokarczuk. La biblioteko ankaŭ havas legejon por la plej junaj, kiu disvolvas bonajn kutimojn kaj instruas legi librojn jam de frua aĝo.

Fine de nia unika renkontiĝo mi donacis al la universitato libron en Esperanto, "Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero", por instigi homojn ekkoni kaj lerni ĉi tiun lingvon.

Klubo de bona libro

La Biblioteko de Juna Amiko por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj.

Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco.

La proponojn kun la titolo, la aŭtoro kaj mallonga rekomendo bv. sendi al la supra adreso, aldonante la noton: "Biblioteko de Juna Amiko".



Tanzanio, ĝiaj flago kaj blazono

Ĉi-jare en Tanzanio, en la urbo Aruŝa, okazis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi estis sukcesplena kaj do ni, mi kaj Cristina Bolini, decidis ĉi-numere prezenti la landon.

Tanzanio estas grava loko por ni ĉiuj, ĉar ĝi estas la "lulilo de la homaro". Sudoriente de la lago Viktoria troviĝas la Valo de Olduvai (svahile *Bonde la Oltupai*). Ĝi estas prahistoria,



Rekomendo

Por la Biblioteko de Juna Amiko mi rekomendas la libron "Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero" de Mara Rockliff.



Ĝi estas escepta bildlibro por infanoj, sed ĝin mi ankaŭ rekomendas al plenkreskuloj. La libro estas bele ilustrita de Zosia Dzierżawska. La ĉarmaj ilustraĵoj kunludas kun la enhavo de la libro.

La aŭtorino rakontas mallonge historion de la lingvo Esperanto. Ni ekkonas plurektan Bjalistokon, junan kaj ankaŭ plenaĝan Ludovikon Zamenhof kaj komunikadproblemojn en la urbo.

Komence, ni akompanas junan Ludovikon, kiu provas solvi lingvan problemon, verkante la novan lingvon. Ni vidas kiumaniere la juna kreinto klopodas enkonduki ŝanĝojn tiel, ke la lingvo estu pli kaj pli facile lernebla. Ni akompanas ankaŭ pli maljunan Ludovikon, kiu ekkonas sian edzinon, eldonas libron pri sia lingvo kaj observas disvolvon de la lingvo. Fine de la libro, kune kun Ludoviko Zamenhof, ni partoprenas en la unua Universala Kongreso de Esperanto kaj ni estas atestantoj, ke Esperanto estas brila solvo de la komunikadproblemoj de la mondo.

la plej grava paleoantropologia loko. Britaj kaj kenjaj arkeologoj fosis la valon kaj ilia laboro donis pli bonan komprenon pri la komencoj de la homa evoluo.

Mi invitas vin en

Tanzanion. La flagon (sube meze) kaj la blazonon de la lando (sur la sekva paĝo) kiel kutime prezentas la itala esperantistino Cristina Bolini (fine de la artikolo estas informo pri ŝia libro).



Tanzanio

Tanzanio (svahile: *Tanzania*) estas lando, kiu situas en orienta Afriko. La lando konsistas el la kontinenta parto, kiu nomiĝas “Tanganjiko” (kiu en la loka lingvo signifas: “akvujo plena de fiŝoj”) kaj apudkuŝanta insularo Zanzibaro. La nomo “Tanzanio” konsistas el la komencaj silaboj de la du partoj: **Tanganjiko** kaj **Zanzibaro**. La ĉefurbo de la lando estas Dodoma. Ĝi estas ankaŭ administra centro de la samnoma regiono.

La klimato de Tanzanio estas tropika, sed ekzistas diversaj lokaj klimatoj. Tanzanio estas hejmo de la plej belaj kaj plej grandaj parkoj en Afriko. Ĉi tie oni ankaŭ povas vidi la plej diversajn kaj unikajn pejzaĝojn – de herbaj ebenaĵoj ĝis arbaroj, rokformacioj kaj montopintoj. Tanzanio ofertas mirindajn eblecojn por viziti. Krom multaj allogaĵoj surtere, ĉi tiu lando ankaŭ ofertas allogaĵojn ligitajn kun akvo. Ĉi tie estas belaj marbordoj kaj oceano, kiu kaŝas riĉecon de subakva mondo. Zanzibaro havas la plej pitoreskajn strandojn en la mondo, kiujn oni opinias kiel la plej belaj en la tropikoj.

En Tanzanio troviĝas tri el la plej famaj mirindaĵoj de Afriko: **Kilimanĝaro** – la tegmento de Afriko, **Ngorongoro** – natura Noa Arkeo, kaj la grandaj ebenaĵoj de la **Serengeti** – la plej granda populacio de sovaĝaj mamuloj.

Tanzanio estas plejparte loĝita de bantuaj triboj kaj, en pli malgranda mezuro, la masajoj, sed en la lando vivas almenaŭ 120 etnaj grupoj. Ĉiu el ili konservas siajn tradiciojn kaj protektas siajn valorojn. Ĉiu tribo havas la proprajn



Blazono de Tanzanio

dancojn kaj popolajn artajn tradiciojn. Famaj estas la abstraktaj lignoskulptadoj (fetiĉaj figuroj kaj maskoj) de la masajoj. Unika stilo de pentrarto estas la bunta Tinga Tinga. La nomo de la stilo devenas de ĝia fondinto, Edward Saidi Tingatinga. Ĉi tiun unikan pentroarton karakterizas fortaj koloroj, komplikaj ŝablonoj de afrika faŭno, amuzaj bestoj kaj

scenoj de ĉiutaga vivo.

Ĉiu etna grupo havas sian propran lingvon. Tamen la nacia oficiala lingvo estas la **svahila**, kiu estas uzata por intertriba komunikado kaj por oficialaj bezonoj. En Tanzanio oni ankaŭ uzas la anglan (kiu estis la kolonia lingvo) kaj malpligrade la germanan (vaste konata dum la kolonia periodo).

Tanzania literaturo estas ĉefe parola, sed nun tio ŝanĝiĝas. Ĉi tiu literaturo ĉefe inkluzivas popolajn fabelojn, poemojn, kantojn, proverbojn kaj enigmojn. Precipe floras la svahil-lingva poezio.

La multkulturismo de Tanzanio speguliĝas ankaŭ en ĝia kuirarto. Ĝi estas miksaĵo de malsamaj kuirartaj tradicioj, inkluzive de bantu, araba, irlandia, hinda, brita kaj eĉ ĉina kuirarto.

La regionoj situantaj sur la kontinento havas siajn tradiciajn pladojn, kiel ekzemple wali (rizo), ugali (maizkaĉo), nyama choma (rostita viando), mshikaki (marinita bovaĵo), samaki (fiŝo), pilau (rizo



« Flagoj de Zanzibaro kaj Tanganjiko. »





miksita kun diversaj spicoj), *biriyani* kaj *ndizi-nyama* (plantagoj kun viando).

Laŭ la marbordaj regionoj (interalie: Zanzibaro kaj Pemba) multaj spicaj pladoj estas manĝataj uzante marmanĝaĵon kun kokosa lakto. En Zanzibaro ekzistas longa tradicio vendi manĝaĵojn ĉe surstrataj vendejoj.

En Tanzanio estas la tradicio trinki teon, kiun postlasis la britoj. La teo estas trinkita kiel miksajo de akvo kaj lakto kun aldono de tefolioj, kardamomo kaj cinamo. Ĝi estas la plej bona trinkaĵo por varma vetero.

En Tanzanio agas Tanzania Esperanto-Asocio (TEA). Ĝi estis fondita en 1992 kaj havas sian sidejon en la iama ĉefurbo Daressalamo.

Rotary Esperanto Klubo Brasil finance subtenas realigon de la projekto “Lernejo Verda Lingvo” en Muleba. La loka grupo de volontuloj aktive kunlaboras, kreante belan lokon por infanoj. Surloke, la ĉefa aganto estas la esperantisto, membro de nia Klubo, John Emmanuel Magessa. Tiu escepte belega lernejo estis ekkonstruita komplete de fundamento kaj la infanoj en ĝi ĝoje lernadas kaj pasigas tempon.



Tanzanio naskiĝis en la jaro 1964 kiam la ŝtatoj de Tanganjiko kaj Zanzibaro (eksaj germanaj kolonioj ekde la jaro 1885 ĝis la unua monda milito, poste fariĝis britaj teritorioj) kununiĝis.

Same kiel la nomo Tanzanio devenas de la kunfandiĝo de Tanganjiko kaj de Zanzibaro, tiel en la nova flago oni povas retrovi kolorojn de ambaŭ la malnovaj landoj.

Bluo-verdo-nigro estis koloroj de Zanzibaro (horizontala trikoloro, vidu maldekstre) kaj Tanganjiko havis horizontalajn bendojn verdo-nigro-flavajn borderitajn. Tanzanio reprenis ĉiujn kolorojn diagonale aranĝitaj, por esprimi la egalecon de la fondaj ŝtatoj en la nova nacio. La fekunda grundo estas simbolata per verdo, kiu ankaŭ rilatas al la naturaj rimedoj. La du etnioj (swahili kaj bantu) estas reprezentataj per la nigro. Bluo simbolas lagojn de la lando (precipe la lago Tanganjiko, kiu donis nomon al la lando) kaj la Hindan Oceanon (Zanzibaro estas insula ŝtato).

La du maldikaj orumitaj bendoj rilatas al la karbaj minejoj.

Zanzibaro havas statuson de duon-administra sendependeco, kaj pro tio en 2005 decidis adopti sian propran flagon, kiu tamen ne povas esti utiligata dum la internaciaj renkontiĝoj.

Ĉi tiu flago reprenis la malnovan flagon de Zanzibaro kun aldono, sur la dekstra kantono de flago de Tanzanio. Oni povas retrovi kolorojn de la flago sur la ŝtata





blazono, kiu estas ŝildo, subtenata per viro kaj virino verde vestitaj, apogigita sur la monto Kilimanĝaro. La ŝildo estas vertikale dividita en kvar zonoj. Supre oni povas vidi flamon de libereco, kiu lumigas aliajn sektorojn. Sube estas la ŝtata flago kaj ruĝa zono, sur kiu estas kelkaj agraraj iloj (simbolo de agrikulturo kaj de la grundo).

La lasta parto estas dediĉita al akvo, simbolata per du bluaj ondoformaj linioj sur blanka fono.

Sur la bazo de la monto estas plantoj de kafo kaj de kotono, ĉefaj enspezofontoj de la lando.

La nacia devizo estas: *“Uhuru na Umoja”* (“Libereco kaj Unueco”).

[*La informoj pri Tanzanio estis prenitaj el Vikipedio (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Tanzanio>) kaj de amikoj, vizitantaj la landon.

*Aĉeti paperan aŭ e-pub version de la libro de Cristina Bolini vi povas vizitante: www.youcanprint.it/flagoj-historio-kaj-kuriozajoj/b/5fd68326-c8db-52f2-9adb-1ab36264316e/ aŭ pere de Amazon www.amazon.it/Flagoj-Historio-kurioza%C4%B5oj-Cristina-Bollini/dp/B0B282PDNK/ref=sr_1_1?__mk_it_IT=%C3%85M%C3%85%C5%BD%C3%95%C3%91&crid=ZDPUGKNV1ZTA&keywords=Flagoj&qid=1675710277&srprefix=flagoj%2Caps%2C177&sr=8-1]



Legendo

Mi proponas al vi legendon pri tanzanito. Ĝi estas la juvelŝtono konata de la loĝantoj de Tanzanio jam de longa tempo, sed oficiale ĝi estis malkovrita de la gemologo Manuel de Souza el Goao en la jaro 1967. Ĝi troviĝas nur en unu loko en la mondo, en la Merelani Montetoj, situantaj en Tanzanio ĉe la piedo de la Kilimanĝaro-vulkano. Hodiaŭ tanzanito apartenas al la plej amataj gemoj.



Ayanda kaj Tanzanito

Antaŭ multaj miloj da jaroj la tribo de Masajoj suferis pro multjara sekeco. Ilia reĝo ankaŭ suferis kun ili.

Iun nokton la reĝo havis misteran sonĝon. La sekvan tagon li decidis ekiri danĝeran vojaĝon al la pinto de Kilimanĝaro, al la hejmo de la dioj. Li petis sian amatan filinon, Ayanda, prizorgi la popolon ĝis lia reveno.

La sezonoj pasadis. Ayanda zorgis pri la popolo kaj ĉagreniĝis pri sia patro. La popolo adoris sian reĝinon.

Unu nokton Ayanda ankaŭ havis misteran sonĝon. En ĝi, ŝia patro kondukis ŝin al la bordo de grandega lago kun purpurblua akvo. Tiam ŝi ekkomprenis, ke ŝia patro neniam revenos kaj la sonĝo estis



Multajn jarcentojn poste la Masajoj denove travivis malfacilajn tempojn. Ili decidis iri al la legenda Lago de Ayanda, sed tie ne estis blu-purpura akvo, sed trovejo de altvalora blu-viola

indiko kaj espero. La sekvan tagon ŝi ekiris por trovi la lagon. Ŝi vojaĝis dum multaj semajnoj ĝis ŝi atingis Kilimanĝaron. En la valo de la Merelani Montetoj ŝi trovis la lagon.

Laca kaj soifa Ayanda klinis sin super la akvo de la lago. Ŝi ekvidis la vizaĝon de sia patro en la akvo, sed post iom da tempo ĝi malaperis. Dum ŝi levis la manon, malgranda guto da akvo el la lago falis en ŝian genuon kaj transformiĝis en belan lagokoloran purpurbluan gemon. Kiam ŝi levis la gemon al la ĉielo, ĝi ŝanĝis koloron... Ŝi ridetis kaj tiam komencis pluvi, revivigante la teron.

roko. Tiu ĉi roko, poste nomata **tanzanito**, savis la Masajojn.





Malkovrante gustojn de Toskanio

La 23-an de Aŭgusto grupo de 12 personoj, reprezentantaj Eŭropan Centron de Interkultura Edukado, partoprenis en Kulinaraj Laborsesioj, organizitaj en la monumenta Villa Costa en Toskanio, Italio.



oni ne volas forveturi. Villa Costa situas en la itala urbo Marlia, proksime de Luko (itale: *Lucca*) La posedaĵo estis fondita en la 16-a jarcento kaj zorge restaŭrita de la nuna posedantino, kunlabore kun Giuseppe del Debbio, profesoro pri arto ĉe la *Accademia di Belle Arti di Firenze*. La profesoro certigis, ke la renovigo kongruas kun la origina vilao, kun ĝia klasika toskana stilo. Dank' al tio, ni povis admiri

La gastojn atendis du polinoj: la posedantino de la posedaĵo Maria Bandoni, kaj la laborgvidantino, Aleksandra Seghi.

Ni estis sorĉitaj de la momento, kiam ni eniris. Ni admiris la citrusajn arbojn, starantajn en potoj laŭ la ĉefa avenuo. Ravis nin la bunta kreskaĵo kaj la bele kongruaj kun ĝi toskanaj koloroj de la konstruaĵoj en la posedaĵo. La herbĝardeno akiris specialan admiron, inkluzive de mento, rosmareno kaj meliso. Ĉio ĉi kreis belan, naturan bildon de loko, el kiu

vastajn spacojn, antikvajn meblojn, belajn pentraĵojn, manĝilarojn, buntajn terakotajn plankojn kaj grandegajn plafonajn trabojn.

Kulinaraj laborsesioj, organizataj en Villa Costa, estas gvidataj de Aleksandra Seghi, italistino, kiu loĝas en Toskanio de multaj jaroj. Ŝi ankaŭ estas la verkintino de pluraj libroj pri tiu regiono kaj itala kuirarto. En 2019 ŝi trapasis la regionajn ekzamenojn en Toskanio, por iĝi profesia bakistino kaj sukerajistino. Dank' al ŝi, nia grupo lernis la sekretojn de toskana kuirarto kaj eksciis, ke ĝi baziĝas sur lokaj, laŭsezonaĵ, ĉiam bonkvalitaj produktoj.

Legomoj kaj fruktoj por niaj pladoj venis de amikaj farmistoj aŭ vendistoj de la regiono.

Ĉiu partoprenanto de nia grupo ricevis italan kuirejan antaŭtukon kaj kartojn kun receptoj por planitaj pladoj. La tabloj, starigitaj antaŭ la vilao (nia laborloko) havis la necesajn ilojn: tranĉtabulojn, rulpinglojn, tranĉilojn, kulerojn, bovlojn kaj viŝtukojn. Ĉirkaŭe estis aranĝitaj manĝaĵoj: faruno: tritiko kaj sekalo,





gisto, bakpulvoro, salo, sukero, akvo, oliv-oleo, paprikoj, tomatoj, kukurbo, celerio, verda petroselo, rosmarenbranĉetoj, migdalsemaj, sezamoj, sunfloraj semoj, kakao, ajlo, cepo, ladskatoloj da kikerroj, spinaco, citronoj, parmesano, pinnuksoj, sekvinberoj, butero, malhela ĉokolado, maizflokaj, nigraj olivoj kaj... kukurbetfloroj. Ekzistis ankaŭ pesiloj kaj pastotranĉmaŝinoj.



Malgraŭ la varmeĝo, ni komencis labori kun entuziasmo kaj scivolemo.

Nia entuziasmo igis, ke rapide komencis kreski: toskana pano (tritika kaj sekala), spinaca fokato (*focaccia*), ĉokolada kuko kun rosmareno, "rose del deserto" kun pinnuksoj kaj sekvinberoj. La migdala pasto estis zorge knedita kaj rulita en rulojn, t.e. estontaj *cantucci*. Multan fortostreĉon oni enmetis por fari *tagliatelle*. Knedi la paston, ruligi kaj tranĉi ĝin per maŝino, sekigi ĝin sur tukoj, aŭ sur "saĝa" karuselo, estis tempopostula. Montriĝis, ke la malnova metodo tranĉi paston per "pasta gitaro" estas multe pli efika ol uzi modernajn maŝinojn. Tamen, la plej grava afero estis prepari peston kun kukurbeto por pasto kaj "oreletoj" (*oricciette*), kikerpaston kaj tomatojn por brusĉeto. La leviĝinta fokato (*focaccia*) estis ornamita per tomatoj, olivoj kaj cepo, kaj denove iris al la forno, kaj la *cantucci*-ruloj estis tranĉitaj en bonordajn knedlikojn kaj bakitaj ĝis ora bruno.


La preparitaj pladoj estis metitaj sur longan tablon, en la ĝardeno,



sub antikva, bela magnolio (alta arbo). Ni komencis festeni, manĝi kaj taksu la pretajn bongustaĵojn. Estis ankaŭ tempo por paroli pri Toskanio, ĝiaj valoroj kaj la vivo de polinoj en Italio kaj ankaŭ pri Esperanto, ĝiaj valoroj kaj uzebleco. Bela momento estis enmanigi al ĉiu partoprenanto de laboresioj memordiplomon.

Ni pasigis belan, sunan kaj ĝojan tagon ĉe Villa Costa, plenan de neforgeseblaj momentoj, novaj amikecoj kaj scipovoj. Ni malkovris toskanajn gustojn kaj ni sincere rekomendas Kulinarajn Laboresiojn kun Aleksandra!

Dana Durman-Ulatowska
kaj **Małgosia Komarnicka**



Tra la mondo

Esperanto en nia vivo

Ni ĉiuj iam “ekvidis verdan stelon” en ĉielo super niaj kapoj, kaj ekĝojis, eksciinte pri la lando “Esperantujo”.

Eble ne ĉiuj restis fidelaj “loĝantoj”, sed la ideo de la lingvo, same kiel mem la lingvo estis kaj estas belegaj.

Jes, estas multe da Esperanto-grupoj, sed antaŭ jaroj mi pripensis pri la grupo, kiu iĝos konversacia “tablo” por ĉiuj esperantistoj, kie ni povus paroli pri ĉio – muziko, literaturo, novaĵoj, pri niaj sukcesoj kaj malsukcesoj, pri niaj ŝatokupoj, rememoroj, pri interesaj homoj apud ni, pri Esperanto-agado en niaj landoj, pri ĉio, kio estas parto de nia Esperanto-vivo!


Ĉe nia “tablo” ni nur ne parolu pri politiko, ĉar ĝi ne akcelas la amikecon inter homoj.


La grupo “Esperanto en nia vivo”, aŭ “Nia vivo en Esperanto” bonvenigas ĉiujn, kiuj ankoraŭ kredas, ke ne nur Beleco, sed ankaŭ Amikeco povas savi la mondon.

Dankon, dankon al ĉiuj, kiuj aktivis en la grupo*, kiuj ŝatas la grupon.

Ni bonvenigas vin!

Rita Mkrtychan, Armenio





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
la gvidantino
de Esperanto-klubo
“Betuleto”, Rusio.
lena_espero@mail.ru



Simple Brazilo...

Saluton, karaj legantoj!

Jam estas Septembro, kaj tio signifas, ke en multaj landoj komenciĝis nova lernojaro. Ni gratulas ĉiujn lernejan-ojn kaj deziras sukcesojn kaj ĝojon de novaj scioj!

Tamen ne ĉiuj landoj festas novan lernojaron aŭtune. Ie ĝi komenciĝas Aŭguste, ie en Aprilo kaj ie en Februaro. Ja nia mondo estas vasta kaj interkultura. Kaj tio ege bonas, ĉar diverseco ĉiam naskas intereson al novaj scioj kaj spertoj.

Ĉi-foje ni invitas vin viziti Brazilon – unikan landon kun originala kaj riĉa kulturo. Kial Brazilon? Ĉar tie okazis en 2024 la ĉefa jara kunveno de ILEI



– la Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Bona okazo por konatiĝi kun la lando, ĉu? Do, ek al interesaj scioj pri Brazilo! Brazilo estas la plej granda lando de Latina Ameriko. Ĝi okupas duonon de la Sudamerika kontinento. En la mondo Brazilo staras sur la 5-a loko laŭ sia teritorio.

Brazilo situas en sudtropika regiono. Ĉi-tie kreskas triono da mondaj arbaroj kaj homoj dense loĝas nur en oriento kaj sud-oriento de la lando. Eble, pro tio Brazilo havas la plej riĉan faŭnon kaj floron en la Terglobo. Sciencistoj kalkulis pli ol 1600 speciojn de birdoj, 600 speciojn de mambestoj, kaj en arbaroj – 77 speciojn de simioj.

Norde de Brazilo fluas la plej granda rivero en la mondo – Amazono. Oni juste konsideras ĝin kiel reĝinon de riveroj! Ja ĝi estas la plej longa, la plej larĝa kaj la plej plenakva. Ĝia fluo estas videbla en Atlantika oceano post 300 km. Antaŭnelonge sciencistoj malfermis, ke sur ĝia grundo al la oceano fluas ankoraŭ unu subtera fluo. Ĉirkaŭ Amazono situas netrairebla ĝangalo. La ĉefurbo de la





ŝtato Amazonio estas la urbo Manaŭso (*Manaus*).

En Amazonio preskaŭ ne ekzistas vojoj. Tie oni moviĝas sur akvo. Ju pli oni eniras Amazonion, des pli senhomaj la ĉirkaŭaĵoj iĝas. Kaj oni pli vidas, kiel belega estas la regiono!

Entute en Brazilo troviĝas 64 naciaj parkoj, kie oni gardas bestojn kaj plantojn. Vi povas renkonti en la lando ĉiujn naturajn miraklojn: oceanon, riverojn, insulojn, gigantajn marĉojn, ĝangalon, savanojn, salajn dezertojn, profundajn kavernojn, bizarajn rokojn, nekredeblajn bestojn...

Ekzemple, en la nacia parko de la ŝtato Maranjo (*Maranhão*), nord-oriente de Brazilo troviĝas unika loko – «litotukoj de Maranjo». Ĉi-tie estas la plej blanka salo sur nia planedo, altaj 12-metraĵ dunoj kaj inter ili – sensalaj lagetoj. Kiam blovas vento, salo moviĝas. Kaj la dezerto aspektas, kvazaŭ iu movas litotukon. Dum pluvsezonoj en lagetoj estas multe da fiŝoj kaj aliaj maraj bestoj. Dum seka sezono lagetoj sekigiĝas kaj iliaj loĝantoj malaperas. Kiel tamen daŭras poste vivo en tiuj lagetoj? Ne estas ĝusta respondo, nur hipotezoj. Do, karaj legantoj, eble, vi solvos tiun enigmon, ĉu?

Ĉiuj certe aŭdis pri la famaj akvofaloj *Cataratas do Iguaçu* ĉe la limo inter Brazilo kaj Argentino. Ĝi estas vera miraklo de naturo! Pli ol 20 milionoj



da turistoj ĉiujare alvenas por ĝui la akvofalojn. Estas interese, ke roko de akvofaloj malrapide moviĝas. Kaj dum 20 miloj da jaroj jam “forrampis” je 28 km.

Iam Brazilo gloriĝis

pri akiro de oro, alportis en Eŭropon kaŭĉukon kaj mahagonon. Poste oro iom post-iome finiĝis, tamen oni trovis en tera internaĵo preskaŭ duonon de rezervaĵoj de fera erco kaj sur la Atlantika bordo – riĉajn minkampojn de nafto.

Sur tre fekunda tero de Brazilo maturiĝas la plej granda rikolto de kafo. Laŭ la legendo, kafarbon portis al Brazilo amo: Fama virino donacis la planton al sia amato. Oni komencis kultivi ĝin, kaj tio ŝanĝis la historion de la lando.

En la komenco de la 20-a jarcento Brazilo produktis 80 % da grajnkafo. Ankaŭ nun ĉiu tria taso da kafo estas el Brazilo. Kompreneble, ke en la lando ekzistas ankaŭ Santos de kafo. Ĝi situas en la mara haveno Santos apud San Paŭlo.

Brazilo konsistas el 26 regionoj-ŝtatoj kaj unu Federala ĉefurba distrikto. La ŝtata flago de Brazilo havas sloganon: “Progreso kaj ordo”.



La ĉefurbo de la lando nomiĝas **Braziljo** (*Brazilia*). Ekzistas interesa legendo pri ĝi:





“En 1883 jezuita monaĥo Ioanno Bosko vidis sonĝon. Anĝeloj kondukis lin tra la tuta Brazilo kaj haltis ie inter 15 kaj 20 latitudoj. Tie staris belega urbo – la ĉefurbo de potenca nacio. En la urbo estis ĉio por feliĉa vivo de homoj...”. Hodiaŭ oni nomas Braziljon “la unua ĉefurbo de moderna civilizacio”. Ĝia arkitekturo estas anoncita kiel havaĵo de la tuta Homaro kaj eniras en la liston de Tutmonda Heredaĵo de UNESKO. El birdfluga alteco la urbo similas al silueto de aviadilo: fuzelaĝo* estas administraj distriktoj, du grandaj flugiloj – loĝkvartaloj. Ĉirkaŭas la ĉefurbon verda zono: Botanika ĝardeno, grandegaj urba kaj nacia parkoj. En Braziljo loĝas preskaŭ 2 milionoj da homoj. La urbo ne havas strat-nomojn. Oni uzas literojn kaj ciferojn por indiki adresojn.

En ĉiu loĝkvartalo de Braziljo estas propra vend-strato, preĝejo kaj preskaŭ forestas urba transporto. Male, en la administra distrikto etendiĝas vastaj magistraloj, kie estas nek stratkruciĝoj, nek signallampoj. Ilin anstataŭis pontoj-vojsolvoj. Piedirantoj kaj aŭtomobiloj moviĝas laŭ diversaj niveloj. La plej ŝatata transporto por la loĝantoj estas metroo.

La katedralo de Braziljo ne similas al iu alia templo tra la mondo. Ĝi situas... – sub la tero. Ekstere oni vidas nur travideblan kupolon, kiu iom similas al la dornkrono de Kristo.



En orienta parto de Braziljo estas artefarita lago **Paranoá**. Loĝantoj ŝatas ripozi tie. Paranoá estas unu el la plej puraj lagoj en la mondo.

Aliaj du grandaj urboj de Brazilo estas **Rio-de-Ĵaneiro** (*Rio de Janeiro*, portugale)



kaj **San Paŭlo** (*São Paulo*, portugale).



La nomo “*Rio de Janeiro*” signifas “januara rivero”. La urbo konstruiĝis laŭ la oceana bordo, tial ĝi havas 90 kilometrojn da salaj plaĝoj. 200 jarojn Rio-de-Ĵaneiro estis la ĉefurbo de Brazilo. Tie situas la mondfama statuo de Kristo (vidu supre).

* *Fuzelaĝo* estas aviadila korpo.

** *Magistraloj*: neologisme por ĉefaj trafiklinioj.



San Paŭlo ankaŭ estas grava urbo por Brazilo. Ĝi estas la plej granda urbo de Suda Ameriko kun 20 milionoj da loĝantoj. En la katedrala placo situas la simbolo de prospero de Brazilo – kafarbo. Oni diras, ke necesas tuŝi ĝin kaj peti riĉecon. Tre ŝatas brazilanoj la Muzeon de futbalo en San Paŭlo. Ĝin organizis, inter aliaj, la mondfama futbalisto Pelé.



Do, en tiu unika lando okazis la 57-a kongreso de ILEI, la 20-27/07/2024, en la urbo Maceió (prononcu: *ma'sejÓ*). Ĝin partoprenis 83 esperantistoj el kvar kontinentoj. La ĉeftemo estis “Esperanto por justa edukado”. La tradicia simpozio havis ĉi-jare la temon “Lingvoj de instruado kaj justa edukado”.

La programo de la kongreso kiel kutime estis tre abunda kaj varia: diversfakaj prelegoj, atelieroj, koncertoj, divers-temaj vesperaj programeroj, allogaj ekskursoj. Oni aparte festis la Internacian Tagon de Esperanto la 26-an de Julio.

Pli detale eblas legi pri la kongreso en la septembra numero de la revuo “Esperanto”. Vi povas ankaŭ spekti multajn programerojn de la 57-kongreso en la jutuba kanalo de ILEI: www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/videos.



Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro



Do, karaj legantoj!
Interkultura Mondo prezentis al vi nur kelkajn allogajn faktojn pri moderna

Brazilo – la lando de la ĉi-jara kongreso de ILEI. Tamen ni invitas vin ekkoni multe pli pri ĝiaj historio, kulturo, tradicioj! Ja konatiĝi kun novaj landoj kaj popoloj ĉiam estas utila kaj interesa! Des pli kiam vi havas perfektan ilon por tio – nian lingvon Esperanton. Do, bonvenon al ILEI-kongresoj! Bonvenon al Brazilo kaj aliaj landoj de nia mirinda unika komunumo – Esperantujo! La artikolo estas kompilita laŭ la malfermitaj fontoj de la ruslingva parto de Interreto.

Por lernemuloj: Nivelo 1. Rerakontu la tekston (ĝian parton) laŭ la alineoj. Nivelo 2. Respondu la demandojn: 1. Kiam komenciĝas nova lernojarro en via lando? En Brazilo? 2. Pri kio gloriĝas Brazilo? 3. Kiu rivero estas la ĉefa en Brazilo? Kion vi scias pri ĝi? 4. Nomu la plej grandajn urbojn de Brazilo. 5. Kiujn enigmojn kaŝas Brazilo? 6. Kiuj interesaj faktoj pri Brazilo plaĉis al vi plej? 7. En kiu loko pasis la 57-a kongreso de ILEI? Nivelo 3. Rakontu, ĉu vi dezirus viziti Brazilon kaj kial.



Interkulture kaj inkluzive

Impresoj de la plej junaj partoprenantoj de la kombinita evento IKBE en Serbio.

Inter la 17-a kaj 24-a de Aŭgusto okazis unusemajna renkontiĝo en Beogrado (urboparto Zemun): la 88-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) kun seminario kaj aldonaj eventoj.

Serbia Esperanto-Ligo organizis la seminarion pri interkultura komunikado kaj kompetento, trejnadon de instruistoj kaj aktivuloj de Esperanto – subtene de Erasmus+, UEA (Universala Esperanto-Asocio) kaj ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Krome, estis okazigita ankaŭ regiona interkonsiliĝo de esperantistaj instruistoj kaj aktivuloj de Balkanio kaj Danubio.

La grupo de junaj partoprenantoj donis freŝecon al ĉiuj kaj laŭbezone ankaŭ helpis al nevidantoj. Tri el ili, Blanka, Stefan kaj Vuk, estis stipendiatoj de la menciita 30-hora seminario.

Jade Hugot (22), Francio: Mi estas tre

dankema pro tiu ĉi riĉiga semajno. Mi dankas, ĉar mi havis la ŝancon partopreni Esperanto-kongreson en Beogrado. Ĝi estis mia unua E-renkontiĝo. Mi tie lernis pli pri la eblecoj de malfermiĝo al la mondo kaj socia inkluziveco per Esperanto. Mi esperas, ke Esperanto daŭre disvastiĝos en la mondo. Ĝi ebligas disvastigi niajn pensojn kaj esti komprenitaj de ĉiuj.

Stefan-Octavian Filip (28), Rumanio: Esperanton mi lernis per Duolingo kaj *lernu.net*. Mi tre ĝojas, ke mi decidis lerni ĝin. Laŭ mi, Esperanto estas la plej justa maniero paroli internacie. Krome, per la internacia lingvo oni povas malkovri novajn landojn, kulturojn kaj ankaŭ amikojn, kiuj pensas simile.

Tiu ĉi ĉeesta okazintaĵo estis por mi la tria fojo renkontiĝi kun esperantistoj. Estis plezuro por mi partopreni la kongreson, ĉar mi havis la ŝancon konatiĝi kun mirindaj amikoj, lerni kaj amuziĝi. Mi enamiĝis en Serbion kaj ĝian popolon.

Vuk Mladenović (21), Serbio: Samtempe kaj samloke kun IKBE estis okazinta

seminario “Interkulture kaj inkluzive”. Ĝi havis tre bonajn prelegantojn – internaciajn kaj serbiajn. Tiu seminario estis la ĉefa intereso de ni, vidantaj junuloj, tie. Ni sukcesis amikiĝi rapide kaj kune pasigi preskaŭ ĉiun vesperon. Mi ekkonis ankaŭ plurajn pli aĝajn esperantistojn, kun kiuj mi ĝuis pasigi tempon por ilia granda vivosperto kaj interesaj rakontoj, kiujn ili rakontis al mi. Mi ne povas decidi, ĉu mi pli ŝatis la seminarion mem, aŭ ĉeestantajn homojn, kun kiuj mi amikiĝis.

Blanka Laslo (26), Serbio: Estis mia unua fojo partopreni en LIBE-kongreso (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj). La kunlaboro kaj kunloĝado de





nevidantoj, malfortevidantoj kaj vidantoj estis bonetosa kaj tre instrua por mi. Kiel stipendiulo de Serbia Esperanto-Ligo mi aŭskultis seminarion, kiu temis pri interkultura kompetento, inkluziveco, projektmastrumado kaj pri eblecoj kaj teknikaj helpiloj por nevidantoj. Fine de la kongreso okazis tre amuza kaj varia arta vespero, kiu kronis la tutsemajnan amikumadon. Kompilis: **Aranka Laslo**

Mia Sarajevo

Sarajevo, la urbo kie mi loĝas, estas vera trezorejo de historio kaj kulturoj, kiuj interplektiĝas je ĉiu paŝo. Ĉirkaŭita de montoj, ĝi donas senton de protekto, sed ankaŭ senfinajn eblecojn por esplori la naturon. Vintre la montoj fariĝas skicentroj kaj mi amas la senton de la freŝa monta aero, dum mi glitas laŭ la deklivoj.

Sarajevo estas fama pro Baŝarŝija, la koro de la malnova urbo, kie oni povas trovi diversajn suvenirojn, tradiciajn pladojn kaj senti la spiriton de Otomana Imperio. Unu el miaj plej ŝatataj pladoj estas kebabetoj, kiujn ni ĉiam manĝas kiam ni havas gastojn el aliaj urboj.

La urbo estas plena je verdaj areoj kaj parkoj, kie mi ŝatas pasigi tempon, legi aŭ promeni kun geamiko. Sarajevo ankaŭ estas urbo de junuloj, kun multaj festivaloj,

koncertoj kaj eventoj, kiuj kunigas homojn kiuj havas diversajn interesigojn. Mi ŝatas, ke ĉiu povas trovi ion por si en Sarajevo, ĉu pri sporto, kulturo aŭ edukado.

Min aparte fascinas riĉa historio de la urbo, de la Romia Imperio ĝis modernaj tempoj, kun postsignoj lasitaj de ĉiu epoko. Sarajevo estas urbo, kiu instruas toleremon kaj kunvivadon, kio donas al mi esperon pri pli bona estonteco.

Tra Sarajevo fluas la rivero Miljacka, kiu, bedaŭrinde, estas tre malpura. Tamen tio, kio ankoraŭ restas nedifektita, estas la fonto de rivero Bosna, tiel nomata "Vrelo Bosne", kiun mi ofte vizitas.

Mi amas mian urbon pro ĉio, kion ĝi ofertas, sed ankaŭ pro la sento de aparteno kaj kuneco, kiu apenaŭ troviĝas en aliaj lokoj. Sarajevo estas pli ol loko sur la mapo; Sarajevo estas sento, kiun mi portas en mia koro kien ajn mi iras.

Tarik Haĝirović (Tarik Hadžirović)

Tarik estas mezlerneano el Bosnio kaj Hercegovino. Li en aprilo 2024 finis la retan kurson de Esperanto por komencantoj-nevidantoj, organizatan de Serbia Esperanto-Ligo, sub gvido de Nedeljka Ložajić. Tiu ĉi teksto ekestis dum la kurso, kiel hejmtasko.





La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Novulo kun brila ideo, ĉu?

Nova laboranto eklaboris en la besto-ĝardeno. Li havis grandajn ideojn.

Li parolis al la direktoro pri nova aŭdaca plano. “Estimata sinjoro direktoro, mi vidas la kompatindajn birdojn. Ili vivas ĉiam en malgrandaj kaĝoj; ili tamen volus flugi libere. Jen mia propono: ni kreu multe pli grandan kaĝon, kaj metu ĉiun birdon en ĝin”. La direktoro konsentis, kaj li rajtigis grandan pagon por la konstruado de unu granda kaĝo.

Kiam la kaĝo estis preta, ili movis ĉiujn birdojn al la nova kaĝo kaj atendis la rezulton.

Post unu semajno, la direktoro demandis al la nova laboranto:

“Kio okazis pri tiu plano meti ĉiujn birdojn en unu grandan kaĝon?”

“Nu, sinjoro direktoro, mi havas por vi bonan novaĵon kaj malbonan novaĵon. Kiun vi volas aŭdi komence?”

“Ve! Donu la malbonan novaĵon unue.”

“Preskaŭ ĉiuj birdoj mortis.”

“Terure! Sed, donu la bonan novaĵon!”

“La agloj kaj vulturoj estas tre sanaj kaj feliĉaj!”



① Vera-Malvera: Ĉu la sekvaj frazoj estas veraj aŭ malveraj?

1. La besto-ĝardeno dungis novan laboranton.
2. La direktoro ricevis unue la bonan novaĵon.
3. La kanarioj kaj la paseroj estas tre sanaj kaj feliĉaj.
4. Ili movis ĉiujn birdojn al la nova kaĝo kaj atendis la rezulton.
5. La nova laboranto havas por la direktoro du bonajn novaĵojn.
6. La direktoro rifuzis la ideon de la nova laboranto pri la birdkaĝoj.
7. La nova laboranto eklaboros en besto-hospitalo.
8. Preskaŭ ĉiuj birdoj mortis.
9. Post unu monato, la direktoro demandis pri la rezultoj de la nova plano.
10. La nova plano pri la birdokaĝo estas aŭdaca.

Via sumo el dek poentoj:

② Ordigu la frazojn por redoni la rakonton:

1. La plano postulas la konstruon de granda kaĝo.
2. La agloj kaj vulturoj estas tre sanaj kaj kontentaj.
3. La direktoro scivolis pri la rezulto de la nova plano.
4. La direktoro petis ricevi unue la bonan novaĵon.
5. Tiu plano rilatas al la prizorgo de la birdoj.
6. La nova laboranto alportis du novaĵojn.
7. La direktoro dungis novan laboranton.
8. La nova laboranto havas aŭdacan planon.

Via sumo el ok poentoj:

3 Trovu la vortojn el la rakonto. La literoj estas miksitaj

- | | |
|-----------------|---------------|
| 1. OKĜA | 7. METAASIT |
| 2. JUVUOLT | 8. AAACŬD |
| 3. NJKAPOMITDAN | 9. DEBETAĜOON |
| 4. BLIREE | 10. ĴOOVAN |
| 5. RODIKETRO | 11. TRUEER |
| 6. SUDKNATORO | 12. ZOTELU |

Via sumo el dek du poentoj:

4 Ligu la du frazpartojn

1. Ili vivas ĉiam en malgrandaj / por realigi la aŭdacan planon.
2. Nu, sinjoro direktoro, mi havas por vi / kaĝoj; ili tamen volus flugi libere.
3. Ili movis ĉiujn birdojn al la nova / besto-ĝardenon.
4. Post unu semajno, la direktoro / ĉiujn birdojn en unu granda kaĝo?
5. Kiun vi volas / bonan novaĵon kaj malbonan novaĵon.
6. Kio okazis pri tiu plano meti / demandis al la nova laboranto:
7. "Ve! Donu la malbonan / kaĝo kaj atendis la rezulton.
8. Nova laboranto eklaboris en la / aŭdi komence?
9. Li rajtigis grandan pagon / besto-ĝardeno.
10. Nu, sinjoro-direktoro, mi havas por vi / ĉiujn birdojn en unu granda kaĝo?

Via sumo el dek poentoj:

5 Elektu la ĝustan vorton

Ni proponas frazon, sed ene de ĝi vi devas elekti la ĝustan vorton, laŭ la rakonto.

1. Ili decidis meti ĉiujn birdojn en unu grandan (kavon/kafon/kaĝon/kajon.)
2. Mi vidas la (kompareblajn/kompatindajn/kompletajn) birdojn...
3. Preskaŭ ĉiuj birdoj (mortis/mordis/mornis/murdis).
4. La agloj kaj (kulturoj/vulturoj/lumturoj) estas tre sanaj kaj feliĉaj.
5. La direktoro demandis al la nova (laboranto/liberiganto/lubrikanto).

6. Ili movis ĉiujn birdojn al la nova kaĝo kaj (etendis/amendis/atendis) la rezulton.

7. La nova laboranto havis (grandajn/gravedajn/gravurajn/grundajn) ideojn.
8. La direktoro rajtigis grandan (paĝon/pagon/pacon/pecon) por la nova kaĝo.
9. La agloj kaj vulturoj estas tre sanaj kaj (feliĉaj/ferocaj/virecaj/feniksaĵj)!
10. Ili tamen volus flugi (vipere/libere/ribele/libele/fi-bele).

Via sumo el dek poentoj:

Jen la fino de la kvino-kvizo.
Via fina rezulto el 50 poentoj!:





Landaj Rezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnickyy@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** József Németh, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Koreio:** 464 Ho, Toegye-ro 217, Jung-gu Seoul, KR-04558, Republic of Korea, Korea Esperanto-Asocio, K-filio de ILEI, *www.esperanto.or.kr*, *kea@saluton.net*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **Nov-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluwin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 2014 Capitol Ave #100, Sacramento CA 95811; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.

Kolibrido

Aŭtoro: José de J. Campos Pacheco. Desegnisto: David Yabor

Tradukis: José de J. Campos

